Limburga Tago – Achel – 08-05-2022

Je la 12:00-a horo ĉiuj estis sur la parkejo “Het Mulke” en Achel. Ni estis 17-ope, venante el 3 landoj: Belgio, Nederlando kaj Italio. Jes, 3 italaj junulinoj nin akompanis. Ili loĝas nun en Maastricht por ilia studado.

Post mallonga promenado tra la arbaro, ni atingis la piknikan lokon, kie atendis nin bongusta pikniko pri kio zorgis Ben kaj An.

Je la 14:00-a ni denove ekiris por promeni laŭ kelkaj riveretoj, kampoj kaj arbaro. Intertempe ni “ludis” kiel infanoj kiam ni vidis floson kiun ni mem devis tiri per ŝnuro al la alia flanko de la lageto. Poste, kelkaj bravuloj trairis la rivereton per ŝnurponteto.

Kiam la promenado finiĝis, ni ripozis ĉe trinkejo en la suno aŭ en la ombro. Post la tradicia grupfoto, Mireille regalis nun per glaciaĵo.

La brila tago (laŭvorte kaj figure) finiĝis en restoracio kie ni ĉiuj manĝis picon. Ni povis ankoraŭ babili multe, ĉar por pagi ni atendis dum longa tempo.